



LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 138 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. JANUARO, 1932.

“JANE EYRE”

de Charlotte Bronte

tradukita el la angla de H. Bulthuis
eldonita de W. J. Thieme, Zutphen,
Holando.

493 paĝoj; ĉe la B.E.A., prezo tolbinda
11ŝ.

Charlotte Bronte, kun la escepto de E. Browning kaj G. Eliot, estis eble la plej talenta kaj famekonata virino en la literaturo angla de la 19a jarcento. Per sia ĉefromano, “Jane Eyre” ŝi atingis sensacian sukceson, kaj per ĝi influis senteble sur la verkistinojn, kiuj ŝin sekvis. Ĝi estas esence aŭtobiografia, kaj pro ĝiaj kuraĝe realismaj bildoj forte altiris atenton de la leganta mondo.

Temas pri orfino, kiu, sendita al lerninstituto por nedeziritaj infanoj, fariĝas, post kelke da jaroj, tiea instruisto. Poste, trovinte oficon en Thornyfield Hall, sinjora domo, ŝi konatiĝas kun la mastro, Edward Rochester, homo elsuĉinta la sukojn de l'plezura mondo kaj serĉanta ion intelekte pikantan por tion anstataŭi. Li vidas en la etkorpa, viglacierba, sed nebela klerulino, tion, kio ektenas lian intereson, kaj fine amon.

Kiam la libro enmondiĝis, Rochester estis, por la virinaj legantoj, nova tipo de fikcia heroo, malsama ol la senmakulaj, komplezemaj, ame adoremaj “kavaliroj,” kiuj ĝis tiam paŝiris sur la paĝoj de romanoj. Regema mastro, jen brute kruda, jen indulge gentila, li tiranadis super Jane, kiu (laŭ la nova teorio) estante virino, sopiris esti regata kaj posedata de la viro.

La libro abundas je misteroj, teruraj noktoscenoj,—lertaj dialogoj, pensriĉaj meditotaj—kaj entute estas sorĉe alloga rakonto. La lingvaĵo de la tradukinto, s-ro Bulthuis, holandano, estas simpla,

flua, kaj plejparte la frazkonstruo estas bona. Oni legadas la verkon, kvazaŭ ĉenita per la intereso al ĝi, kun rava ĝuo, malgraŭ tio, ke la traduko estas multloke tute ne fidinda, ĉe tre erariga. Ĝi donas frapan ekzemplon de libro, kiu devis esti kontrolata de kompetenta anglo, antaŭ ol oni ĝin eldonis. Neanglalingvanoj ne rimarkos multajn el la deviaĵoj for de la originalo, sed estas tre da lokoj, kie ili haltos antaŭ sence enigmaj linioj. Estas evidente, ke s-ro B. tro foje servigis al si fuŝajn tradukaĵojn, ne atentante la anglan originalon. Estas tre rekomendinde, ke tradukantoj esperantigu nur verkojn de siaj samnacionoj, ĉar estas tre tre malofte, ke alilandano faras tute kontentigan tradukon. Sekvante tiun konsilon, oni evitos tiajn absurdajn erarojn, kiuj preskaŭ ĉiupaŝe makulas ĉi tiun cetere bonan verkon.

P.60. La piednoto devas esti cito al Agoj 20/9, sen kio la aludo en la teksto estas tute nekomprenebla. Kial uzi “tifo” kaj “tifuso”? 393/23, granddame estas grandsinjorino, nobelino, tute ne “avino”! 431/27, “ecclesiastical cousin” (“spirita nevo”!); 301, plebeian (“plej belan”!); 233/22, “with a vengeance” (“pro venĝo”!); 76, “Salomo” (legu: Salomono); 144/31, “edzo” (homo); 216/4, 248/17, forigu la frazojn dirantajn pri amo.

Kelkaj frazoj rekte kontraŭas la originalon. Zorga revizio de anglo estis krie necesa.

(Robo)

Juna Germano deziras korespondi kun legantoj de ĉi tiu gazeto. Per letero aŭ ilus. p.k. Hermann Zwickisch, Henschdorf (Riesengabirge) Warmbrunner-str., 1, ai., Germany.

"DANCU, MARIONETOJ."

Originaloj de J. Baghy.

Eldonita de Literatura Mondo.

2a Eldono. 174 pp. Prezo 3 ŝil. ĉe
B.E.A.

En unu rilato J. Baghy ĝis nun superas sian grandan konkuranton en la kampo de l'poezio, K. Kalocsay. Li estas kromdotita en tio ke li montris sin majstra fabrikanto de la novelo. Jen aperis dua eldono de liaj elektindaj verkoj, "Dancu, Marionetoj."

"Unu el la Kvar" estas sceno el la Dia Tragedio. Romana soldato pelata de la fera disciplino, devas najli al Kruco ĝuste la Manojn, kiuj redonis vidon jam al okuloj filetaj. La admirinda lerteco de nia hungara aŭtoro atingas plejsupran nivelon en la frazjuvela "Uragano." "La Metropolo Malsatas" estas paĝo el la vivo de "ĉiesulino," kies koron ankoraŭ varmas la amo kompata. La plej longa verkaĵo estas "Nur Homo," kiu rakontas psikan batalon de ĉeĥa militkaptito sentanta la animon ŝirata de sensa kaj de spirita amo. "Kiel Mikok instruis Angle" estas gemo de nia bonhumora literaturo. "Tri Kamaradoj," vualita per komikeco, revokas la amaran historion de ĉeĥa militado dum la mondkatalismo.

Ĉi tiu geniriĉa verko kaj similaj, trezoroj de la trafesprimo, decidus venke por Esperanto la demandon pri tio, ĉu ĝi rajtas roli kiel artesprima lingvo, taŭga en ĉiuj rilatoj vortvesti la senfine variajn pensojn de l'homo.

Bedaŭre, la preseraroj de la 1a eldono ankoraŭ restas en la nova. Mankas finpaĝa listo de la iom multaj neologaj vortoj. (Robo)

"LA LINGVO DE LA BESTOJ."

An eloquent plea by Florence Barker, B.A., for a more humane attitude toward the lower animals. She denounces vivisection as a cruel and wasteful absurdity, and asks for help in the worldwide dissemination of the principles laid down in the "Animals' Charter." The speech was delivered in Esperanto at the Oxford Congress. 24 pages, price 3d., from Nacia Konsilantaro pri Bonstato de Bestoj, 36 Gordon Sq., London, W.C1.

NIA ADRESO!

Box 731 F,
P.O., Elizabeth-str.,
MELBOURNE,
Australia.

**THE PYKE MEMORIAL
EXAMINATION**

Was held 14th November in the Australian Church Hall, Melbourne. Six candidates sat, four for the diploma, and two for the prize of £5/5/-, which was gained by Mr. Alfred Pitt. Mr. Pitt, the "best 12 months' student," was recruited to Esperanto as a result of a wireless talk last January. Those to gain the Memorial diploma were Mrs. A. Hintze, Mr. Roy Hastings, and Mr. Max Schmidt.

Indications are that there will be a good entry for 1932.

The committee intends early in the new year to get into touch with groups in the other capital cities with the aim of extending the range of the Examination.

**COBURG ESPERANTO CLUB.
Annual Report.**

The annual meeting of the Coburg Esperanto Club took place in the Labor Hall, Sheffield-st., Coburg, on Thursday, 19th November. The attendance of about 20 showed keen interest in the balance-sheet presented by the secretary, Mr. Spencer. Mr. Williams occupied the chair. The following office bearers were elected for the ensuing year: President, Mrs. Hintze; secretary, Mr. Spencer (re-elected); auditors, Miss Trenoweth and Mr. Williams.

The club has gone on steadily since it was formed two years ago, and expects an influx of new members in the new year. We were pleased indeed to congratulate Mrs. Hintze on gaining her certificate at the Pyke Memorial Examination. Next year we hope a large number of our members will also gain their certificates.

We wish to thank Mr. Glaisher and Mr. Perkins, and also other helpers, for their valuable assistance; and to regret to state that one of our members, Mr. Bob Lowe, is very seriously ill. All members join in wishing him speedy recovery.

In conclusion we wish all clubs and fellow-esperantists a Merry Christmas and a prosperous New Year.

**KOBURGA ESPERANTO-KLUBO.
Jarraporto.**

La jarkunveno de la Koburga Esperanto-Klubo okazis la 17an de novembro en la Laborista Halo, Sheffield-st., Koburgo. Proksimume 20 anoj ĉeestis kaj

montris intereson pri la bilanco donita de la sekretario, s-ro Spencer. S-ro Williams prezidis. La jenaj elektigis: Prezidanto, s-ino Hintze; sek-io, s-ro Spencer; kontrolantoj, f-ino Trenoweth kaj s-ro Williams.

La klubo progresis mezrapide dum la pasinta jaro kaj atendas multon da novlernantoj en la venonta. Plaĉis al ni gratuli s-inon Hintze, kiu gajnis la Ateston de la Pyke Memoriga Ekzameno. Espereble en la proksima jaro multe da niaj anoj gajnos la Ateston. Ni tre dankas al s-roj Glaisher kaj Perkins kaj aliaj instruantoj pro ilia valora servo.

Bedaŭrinde s-ro Bob Lowe, unu el niaj anoj, grave malsanas. Ni ĉiuj deziras al li baldaŭnan resaniĝon.

La Koburga Klubo deziras al ĉiuj samideanoj kaj kluboj "gajan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron"!

LIVERPOOL UNIVERSITY. Esperanto Lectorate founded.

British Esperantists lived through proud moments on the 10th October last year, when, in the great lecture hall of the Liverpool University some 130 educationists gathered for the first ceremony of its kind to take place in any English university.

It was the inauguration of the "J. Buchanan Esperanto Lectorate," now an official part of the language courses in the university. The late Dr. Buchanan left portion of his estate for the establishing of Esperanto in scholastic circles.

Prof. L. Wilberforce presided, and Prof. W. Collinson spoke on The Structure of Esperanto as compared with that of Other Languages, outlined the characteristics of Zamenhof's creation, and strongly urged its fitness for the scientific field.

HAGUE TELEPHONE ADMINISTRATION USES ESPERANTO.

New automatic telephones were recently installed in The Hague, a city largely visited by foreigners. The instructions as to the use of the devices were, therefore, printed in French, German, English and Esperanto, besides Dutch.

The Administration is to be praised for its progressive spirit. Why not send a card of congratulation to:

Gemeentelijke Telefoon dienst,

Marnixstraat 18,

Den Haag, Nederlando.

ESPERANTO ON THE MARCH.

We have learned—

That "The International Good Templar," the quarterly organ of the International Supreme Lodge of Good Templars, has an Esperanto column, giving news of the anti-alcohol movement in all countries.

That Amiens (France) now has its Zamenhof-street; and so has Barcelona, Catalonia's capital.

That, despite the crisis, 3,000 copies of "Das leichte Esperanto" ("Easy Esperanto") were sold in Germany during October last.

That the Italian Tourist Club (400,000 members) will publish No. 2 of the Esperanto guide-books, "Romo." The volume will be about twice the size of the first, "Milano Kaj Lagoj de Lombardio," which has almost been sold out.

That the Czecho-Slovakian railways has published wholly in Esperanto an illustrated booklet, "Monograph of Czecho-Slovakian State Railways."

That the Institute of Meteorology at Ljubjana, Jugo-Slavia, has published a resume of observations, titles of which are in Esperanto as is also a long article on hydrography.

That daily lessons on Esperanto were broadcast from JOBK, Osaka, Japan, from 20th July to 31st August last. Relayed by two other stations, the course was a huge success. **Twenty thousand textbooks** were sold in connection with it.

TO OUR SUPPORTERS

We give thanks for the following:—

Mr. N. Mills, 5/-, Aug., '32; Frau E. Boden (per Mr. Holloway), 5/-, Dec., '32; Mr. F. Luhnig, 5/-, Dec., '32; Miss C. Bauer, 9/-, Dec., '33; Anon, 21/-; Miss L. Saw (donaco), 5/6; Mr. F. Archer (donaco), 10/-; Mr. H. McKerrow, 5/-, Feb., '31; Miss H. Bostock, 2/6, June, '32; Advert, 2/-; Mr. E. Hart, 5/-, Sept., '31; Miss J. Gray, 4/6, Dec., '32.—Total, £3/19/6.

Sir J. A. Thomson, brita zoologo, proponas kiel la kvar ĉefmirindaĵojn de l'universo la jenajn:—

(1) La potenco, kiu tenas la ĉielajn korpojn turniĝantaj sur sia aksō.

(2) La vastegeco de l'spaco.

(3) La delikategaj meĥanismoj, kiuj karakterizas la vivon de ĉe la plej mikroskopaj insektoj.

(4) La bonordeco de l'Naturo mem.

"MINIATUROJ"

de G. D. Nash.

Eld. de Esperanto Publishing Company.
58 p. tcolbinda, 2/6p. ĉe B.E.A.

Kolekto da mallongaj poemoj. Dezi-
rinde estus, ke la verkinto parafrazu
kelkajn el la plej nebulaj en kompre-
neblan prozon. Li montras lingvan
talenton, sed ofte lia penso estas tro
subjektive subtila, kaj evitas la katenon
el vortoj, per kiu li penas ĝin ligi al
la paĝo. Eta Manet' kaj fronta al
Foiro pli impresas.

Demando leviĝas, ĝis kioma grado
havas la poetoj rajton kontraŭigi la
lingvan unuigadon de Esperanto? Ek-
zemple, s-ro Nash uzas "korono," "ri-
tuale," "kalt'" anstataŭ "kron'", "rit'",
"malvarm'" nur por belsonigi lini-
paron. Tiuj formoj estas iom vaste
komprenataj en Eŭropo, sed preskaŭ
tute ne en Oriento. Ni ne oferu for
nian nepre-havendan unuecon ling-
vuzan, lasante al poetoj danĝeran
rimedon eviti malfaciletojn alimaniere
venkeblajn. Ŝajnas esti opinio ĉe kel-
kaj homoj, ke Esperanto ne taŭgos por
la poezio antaŭ ol ĝi ŝvelos ĝiskreve,
englutinte la esencan vortaron de ĉiu
ĉeflingvo de Eŭropo.

Iuj preseraroj ĝenas. Nebona elizio
de akuzativa finaĵo ĉe:

"Ripozon trovu mi en okcident'

Serena sunsubir', kaj bela mortkon-
tent'".

(Robo)

EVANGELIAJ KRISTANOJ.

Abono "La Kristana Revuo"

Jare 1/6p. Dumonata.

"Notoj pri Malnova Testamento"

de M. C. Butler.

Tradukoj de H. Luyken k.a. kom-
petentuloj.Red. F. Hanbury, "Antaŭen," Slewins-
lane, Hornchurch, Essex.**"LA ESPERANTISTO."**

(1889-1895)

Only two persons in the world pos-
sess the complete series of "La Es-
perantisto" (Nurnberg). They are a
Mr. Bailey, in Manchester, and Herr
E. de Wahl, in Reval (Talinn). Herr
Eugen Wuster, of Berlin, has every
copy except No. 11 (1890). It goes
without saying that copies of this
gazette are very valuable, and are
eagerly sought for. The same applies
in varying degree to all the early Es-
peranto organs; especially coveted are
those in which Zamenhof's hand is
seen.

ESPERANTO WORKS!

A certain ex-inspector of schools in
England wished to possess the ex-
tremely rare Ostronomir Gospels in
Russian. He advertised in French and
German papers, visited France and
Germany for to find the work in the
haunts of bibliophiles, but in vain. At
last he informed Mr. W. Hurst, an
Esperantist of Huddersfield, who put
an advertisement in "Heroldo de Es-
peranto" (Koln) and "Esperanto"
(Geneva). He received three replies
from Russia and finally bought the
literary treasure for £10. He would
willingly have given twenty. Is this
not a striking proof of the widespread
influence of Esperanto?

(From "Heroldo de Esperanto")

SENDU RESPONDKUPONON!

Sendante al gazeto por specimen-
numero, nur ĝentile estas enmeti res-
pondkuponon. Cetere estas firma re-
gulo ĉe La Suda Krucó, ke neniam ĝi
sendas specimenon kontraŭ nura peto.
La financa ekvilibro de nia gazeto estas
tiele delikata, ke absolute neeble estas
sendi al homoj volantaj senpagajn ek-
zemplerojn. Pro tio, ke jam kelkaj
gazetoj, adresaroj kaj similaj eldonaĵoj
presis nian adreson sen la nepre necesa
aldono—"Sendu respondkuponon"—ni
ricevadas preskaŭ ĉiupoŝte du-tri petojn
neakompanitajn de la konforma afrank-
kosto. Ni dankus al ĉiu adresaro ktp.
en kiu troviĝas nia nomo-adreso, se ili
tuj enpresus aldone la avertantan linion.

Al ĉiu sendinta resp. kuponon ni ku-
timas ekspedi almenaŭ du ekzemplerojn.

(Redakcio)

BIALYSTOK.

A card to J. Šapiro, Marsz. Pilsud-
skiego 14a, Bialystok, Poland, will
bring you a folder describing the town
where the creator of Esperanto was
born, and a program of the "post-kon-
greso" held there in August. An appeal
is also made for funds to erect a 36-feet
high monument to its famous citizen.
The space has been given and the founda-
tion laid.

LA NEKONATA EVANGELIO

Kiun Kristo predikis, 50-paĝa sen-
paga libreto oferita. Konkiza, en lege-
blaj ĉapitroj. A. Broughton, 140 Wiggan
Street, BIRMINGHAM, Anglujo. Citu
"Suda Krucó."

PARALLEL TRANSLATION.

**"MR. TOT ACETAS MIL
OKULOJN."**

Originalo de Jean Forge.

Eldonita de "Literatura Mondo,"
Budapest.

Paĝoj 243, prezo broŝurita 3s3p., tol-
binda 4s8p., plus 4p. sendkosto ĉe
B.E.A.

Jen la tria romano de J. Forge (plumnomo de poldevenulo Fethke), reprezentanto de la moderna stilo Esperanta. De post apero de lia "Saltego trans la Jarmiloj" ĉi lerta plumo iakiale sekigis, kiom koncernas nian lingvon, sed jam denove ĝi fluas, printrinte kun majstra facileco kolorplenan vivecon de riĉulo, konsumata de l'mondumaj enuoj, kiu venas sub la tiranan potencon de psikoscienca krimulo. Ĉi tiu inventas "televizoron," per kiu li povas vidi tra la muroj de la materio. S-ro Tot acetas ĝin, kio al li malfermas la pordon al teruraj aferoj. La nuda animo de l'homo montriĝas al liaj mirstreĉitaj okuloj kaj bateganta koro; li kapantaŭe saltas en amfrenazon, ĉi aranĝitan de la psikisto kaj ina komplico. Sed Tot feliĉe havas duulon, similulon. Ĉi tiu mortas, kaj lia amito, nesciante pri tio, venas goje en la brakumon de la bonvenanta Tot, kiu vidas en ŝi knabinon fresan, nedifektitan de la societa mondo.

La lingvaĵo estas tre originale esprimita, plena de trafikaj parolturnigoj; ĝi radias vivecan evoluemon. Danĝero nur estas, ke homoj malpli kapablaj ol la aŭtoro, imitante lin, malutilos al la lingvo. Interese estas kontrastigi ĝin kun la lingvo de Kofman kaj Wasniewski, stilistoj de 1898.

La verko estas spicita per iom tre da neologismoj, el kiuj nur kelkaj havas klarigon en posta listo.

"Rasa" (ekz. 8/1) uzata strangasence kvin fojojn (ŝiaj rasaj kruroj!!); manekina pupo (vaksa figuro por magazinfenestro); meneĝero (A manager); filmstatisto?; limuzino (luksa aŭtomobilo); mokko (Mocha kafo); komplico (kunkrimulo); sadisto (psike-malsanulo, kiu avidas kruelon); ateliero (laboreja, metieja). Trouzo de -em; multa verbigado de adjektivoj—necesas sesa senso (!); d-ro K. oportunas en fotelo (brakseĝo); kurioza figura uzo ĉe "strikas" (ĉesas funkcii) la fortoj de la virino." (Robo)

**"MR. TOT BUYS A THOUSAND
EYES."**

An original Esperanto work by
Jean Forge.

243 pages. Price 3/3 and 4/6.

This is the third novel by Jean Forge (pseudonym of one Fethke, of Polish descent), representative of the modern style in Esperanto. After the appearance of his "Saltego trans la Jarmiloj" (Leap over the Milleniums) this artful pen for some reason ran dry, as far as Esperanto is concerned, but now, in flow again, it has painted, with the ease born of mastery, a lurid fragment from the life of a pleasure-worn plutocrat, who comes under the tyrannical power of a criminally-minded psychologist. This scientist has invented a "televizor," by means of which he is enabled to visually penetrate matter. Mr. Tot buys the contrivance, an act that opens for him the door to many a terrible experience. The naked souls of men are revealed to his awe-stretched eyes and throbbing heart; he falls headfirst into an infatuation shamefully arranged by the psychologist and a female accomplice. Luckily, however, Tot has a double; this person dies, and his lover, all unknowing, yields joyfully to the embrace of the willing Tot, who sees in her a girl fresh and unspoiled by Society.

The diction is highly original in its expressiveness, full of apt turns of speech; one sees manifested throughout a lively tendency to evolve the language. The only danger of this is that writers less capable than the author may imitate him to the detriment of Esperanto. It would be interesting to contrast the language of Forge with that of Kofman and Wasniewski, stylists of 1898.

The book is somewhat peppered with neologisms, only a few of which are explained in a list at the back.

1928, 1929, 1930
**JARKOLEKTOJ DE "LA
SUDA KRUCO" ESTAS
HAVEBLAJ.**

ĉe Box 731 F., P.O.

Elizabeth-st., Melbourne.

Interesaj artikoloj kaj skizoj Esperant-kaj angalingve.

Pike atentotenaj prilingvaĵoj kaj librocenzoj.

Prezo: tri ŝilingoj, inkluzive sendkosto, por ĉiu.

(fratorganoj bv. represu)

"HUMAN DOCUMENT"

of Lazarus Ludovic Zamenhof.

"On four sheets of paper he had begun to set down the intimate confession, but death had interrupted him. Three of the sheets contain an explanatory foreword, in which he asked pardon for treating a subject on which he had had no special training. Possibly some will say, as has been said of others, that only after entering on old age he occupied himself with the matter of religion. In anticipatory protest against this he wrote:—

'All that I here set down entered my thought, not now, but some forty years ago, when I was 16-18 years old; although I have since that time meditated much and read different scientific and philosophical works the thoughts I had in those days of God and of immortality have hardly changed a whit.'

"He nevertheless foresaw that this article would be displeasing to many:—

'I shall lose all esteem in the scientific world, and for such loss shall find no compensating sympathy among believers, who, it is more than likely, will attack me, for my creed is quite other than their creed It were prudent that I keep silence, but I cannot.'

"The fourth page was only begun. The writing is almost illegible:—

'My mother was a religious believer; my father an atheist. In my infancy I believed in God and in the immortality of the soul, in the form given by the religion in which I was born. I cannot now remember precisely in what year I lost religious faith, but I recall that I entered the most acute phase of my unbelief at about the age of 15 or 16. That period was also the most tormenting I have ever lived through. Life and all that it means lost in my eyes all reason and value. With contempt I looked on myself and on others, seeing in them and in me nothing more than useless flesh, created one knows not why or for what end—flesh, whose brief life is but a flash in eternity, flesh, which is soon to putrify for ever, and which through countless aeons of time will never be seen again. To what end do I learn, labor and love? For all is so senseless, useless, so ridiculous'

"There the confession ends. On the remainder of the page is jotted a note on the projected sequence of the writ-

ing: after the disgust of life and of death, there came to his mind, at 17, a new thought:—

'I began to feel that possibly death is not disappearance that there exists certain laws of Nature that something is shielding me for a lofty end'

"These were the last words he wrote. Dying, Zamenhof carried his secret with him."

(Pages 198/200 of "La Vivo de Zamenhof," by Dr. E. Privat; translated Robo.)

[George Allen and Unwin have just published the complete book, translated by Ralph Elliott. Price 4/6, at B.E.A., Museum St., London, W.C.1.]

PRI NEOLOGISMOJ.

(Respondo)

Preskaŭ en ĉia pli serioza nacia revuo oni trovas vortojn aŭ esprimojn nekonatajn; estus do troa pretendo voli senescepte kompreni ĉiun vorton aŭ esprimon aperantan en Esperanta gazeto, precipe se temas pri faka esprimo. Eĉ la redaktoro kelkfoje mem ne komprenas la signifon de iu vorto; li devas ĉikaze fidi la kompetentecon de la aŭtoro. Jen la vortoj de via listo klarigitaj laŭ eblo:

Agro (kulturebla kampo); baremo (tabelo de antaŭpretaj kalkuloj); anĥeli (malfacile spiri); ĉantaĝi (trudpostuli de iu monon aŭ favoron per skandalminaco); blago (ŝerca mensogo); forsto (metode flegita arbaro); ŝika (laŭmode bongusta); vito (arbeto produktanta la vinberojn); minusklo, majusklo (malgrand-, grandlitero komenca); orlo (refaldita bordero ĉe tuko aŭ vesto).

Ne maltrankviliĝu pri via Esperanto-kono, se kelkfoje vi trovas vorton aŭ esprimon nekonatan al vi! Tio okazas eĉ al la plejperfektulo. Tio ne estas manko de Esperanto, sed pri tio kulpas nia homa neperfekteco.

ESPERANTO KAJ RADIO.

BRODKASTOJ EN N.Z.

Du stacioj en Nov-Zelando dissendas E-ton, nome 3YA (Christchurch) kaj 1ZR (Auckland). De la unua s-ro N. M. Bell, M.A., longatempe regule parolis ĉiusessemajne, kaj pastro T. R. Wollohall jam de 24 junio parolas el 1ZR pri E-to. En 16 septembro li traktis pri "Esperanto en lernejoj de la tutmondo."

Why Not Advertise in "LA SUDA KRUCO"

The Paper that is NEVER THROWN AWAY,

So your Advertisement is always Alive

Rates on application.

Support those who advertise in "La Suda Kruco"!

"LINGVO, STILO, FORMO"

de K. Kalocsay.

Eldonita de Literatura Mondo,
Budapest.

142 pp. Prezo 4s. 6p. ĉe B.E.A.

Fasko de priliteraturaj studoj verkitaĵoj de eble la plej majstra ankoraŭ vivanta poeto Esperanta, homo riĉe dotita per la lingva sentemeco. Ĝi konsistas el ok eroj: (1) Esperanta Vortfarado. Valora kontribuo al la vortanalizo, temo fundamente grava, sed ankoraŭ studata kun intereso nur de malmultaj. (2) La Evoluoj de nia poezia lingvo, prelegita antaŭ la Oksforda Kongreso. Linion post linio oni lege sorbas. Plenplenas ĝi je rimarkindaj lingvaj sugestioj, kaj pikaj observoj pri la principoj laŭ kiuj laboris Grabowski, tradukante "Sinjoro Tadeo," "la plej granda fortostreĉo en Esperanto." (3) Sendemandaj Respondoj pri diskutindaj punktoj en la lingvouzo. (4) La Esperanta Rimo, ĝis nun plej ampleksa traktato donita pri tiu temo. En ĝi Kalocsay kuraĝe, pacience provas meti bazojn, sur kiuj la poeziaj eblecoj de Esperanto povu pli libere multiĝi, disflori. Sekvas Esperanta Elparolo, Esperanta Ritmo, La Klasika Metriko en Esperanto, kaj fine La Mezepoka Esperanto, en kiu li ŝerce sovas nian lingvon en groteskan veston.

Al multaj, kiuj sentas rajton fanfaroni en si pri siaj Esperantaj konoj, la verko konvinkos, ke vere tiuj konoj estas relative mizeraj. Tamen pride-mandindaj estas unu-du punktoj ankoraŭ dubaj: en la opinio de kelkaj,

la lingvaĵa koncizo ĉe "Sinjoro Tadeo" estas oftloke troa, malfaciligante per tio la fluan legadon. La rimarkoj sub "iu" kaj "ia" povos naski nekonsentojn. Ankaŭ, ĉu oni ne povas uzi la indikativon post "kvazaŭ"? Zamenhof uzis ambaŭ formojn; nesage estas fari malmolan regulon. Estas delikata nuanco de diferenco inter la frazoj: Li marŝas kvazaŭ li estas ebria, kaj. Li marŝas kvazaŭ li estus ebria. En (a) estas subkomprenata opinio, ke li efektive estas ebria, sed en (b) ne estas tia, kaj la signifo nur estas, ke li marŝas kiel marŝas ebriulo. (Eble aŭ efektive li estas lama aŭ malsana). 85. Estas dube, ke "ĝuste" havas tempan forton en la frazo: Li ĝuste manĝas" (ĝuste nun manĝas); ĉu ne "post kiam mi finos (aŭ, kiam mi jam finos) la laboron, mi iros promeni"? Uzi la pasinttempon en la unua frazo ne ĝuste esprimas la penson. 86. Li ek-sedziĝis al (ĉu ne "de") ŝi. 50. "en-vidas" (preseraro? envias); 61/21 venu (rigardu); 63/1 kara (klara); 81 plum-pa vorto (G. plump, —A. clumsy, awkward). —Robo.

TO PHILATELISTS.

According to Soviet law the export of stamps is forbidden to private persons. Business can, however, be done through the Soveta Filatelista Asocio, ul. 1a, Tverskaja-Zamskaja d. No. 3, Moskvo. This association corresponds in Esperanto.

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samaraj; PAPUA;

(fratorganoj afable represu)

POR SVEDOJ.

Ekzercara libro por elementa kurso en Esperanto.

Ellaborita de Sam. Jansson. Prezo sved. kr. 0.50.

La libro kompletigas la kurson perkorespondan de Sveda Esperanto-Federacio, al kiu sin anoncis dum la aŭtuno pluaj du mil partoprenantoj. Krome la libro estas uzota je la radiolecionoj esperantaj, kiuj okazos la unuan dimanĉon en ĉiu monato.

La gramofona kurso en Esperanto estis bone akceptata de la svedaj esperantostudentoj. Pli ol cent kursoj jam estas venditaj. La kurso konsistas el tri diskoj, kiuj kostas kune 12 kr. (por afranko ekster Eŭropo aldonu 5 sv. kr.), enhavas sur la unua disko modelan elparolon kun parte instruado por svedoj, sur la dua ekzemplojn el la Fundamento kaj sur la tria dialogojn. La dua kaj tria diskoj enhavas nur Esperanton.

Novspeca propagandilo konsistas el malgranda mondatlaso, "La tuta mondo sur 14 landkartfolioj," uzata de diversaj firmoj kiel reklamilo. La eldoninto aldonis propagandan tekston pri Esperanto kaj vendas ĝin je sv. kr. 0.35. Ĝi estas vendata kiel mondatlaso, ne kiel propaganda broŝuro esperanta. Ĝi tamen servas kiel propaganda broŝuro.

La granda oficiala libro pri la polustragedio de Andr e, "Per balono al la Poluso," fariĝis tre granda sukceso. De la tuta eldono restas nur ĉirkaŭ cent ekzempleroj, kiujn la eldonejo konservas por la estonteco.

Mendu suprajn ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Sweden.

ROMAIN ROLLAND AND ESPERANTO.

"True it is that the spread of Esperanto will not be sufficient to suppress among men misunderstandings and grounds for quarrel, for in every country, speaking one language, there exists today fierce discord; but Esperanto will make choice among the world's spirits, will group together kindred souls now scattered over the globe and separated by the bars of differing speech. Thus will be formed, over and above the problems of race, class and party, an international people." (Romain Rolland, author of "Jean Christophe," in a letter to Esperantist George Mahn, 1920.)

WESTRALIAN ESPERANTO

SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.

Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Workshop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo

kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto,

s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas

ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-st.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet

every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.